

Ata-ita

Claude Gacond, 164-a radioprelego, 1966.11.30 & 1966.12.03

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni rapide ekzamenos la malkovron de Gaston Waringhien kaj Kalman Kalocsay pri la ekzisto de tri kategorioj da verboj. Por povi bone sekvi nian elsendon, vi devus povi skribi, do bonvolu rapide trovi paperfolion kaj skribilon.

A.- Jen, mi havas kajereton kaj krajonon. Vi povas komenci vian instruon !

Cl.- Bone ! Sur via folio, per du vertikalaj linioj, faru tri kolonojn !

A.- Jen mi havas tri partojn !

Cl.- Ĉiu kolono ricevu nomon de unu el la sufiksoj, kiuj ebligas formi la pasivajn participojn. Se la unua nomiĝas **ota**, kiel nomiĝos la du aliaj ?

A.- **ata** kaj **ita** !

Cl.- Do skribu **ota** kiel titolo al la unua kolono, **ata**

A.- kiel titolo al la dua, kaj **ita** kiel titolo al la tria.

Cl.- Nun mi parolos en la aktivo, kaj vi rediru miajn frazojn en la pasivo, uzante unu el la sufiksoj **ota**, **ata**, aŭ **ita**. Mi komencas : *Jen la plano de la domo, kiun sinjoro Vatré konstruos.*

A.- *Jen la plano de la domo... konstruota... de sinjoro Vatré.*

Cl.- Vi bone komprenis. Skribu ĉiam la pasivan participon en la konvenan kolonon.

A.- Mi do skribas **konstruota** en la **ota**-kolono.

Cl.- Mi daŭrigas: *Jen la plano de la domo, kiun sinjoro Vatré konstruas.*

A.- *Jen la plano de la domo... konstruata... de sinjoro Vatré.* Mi skribas **konstruata** en la **ata**-kolono.

Cl.- *Jen la plano de la domo, kiun sinjoro Vatré konstruis.*

A.- *Jen la plano de la domo... konstruita... de sinjoro Vatré.* Mi skribas **konstruita** en la **ita**-kolono.

Cl.- Kiom da pasivaj participoj havas en tiu ekzemplo la verbo **konstrui** ?

A.- Kiel normale : tri : **konstruota**, **konstruata** kaj **konstruita**.

Cl.- Nu ni vidu, ĉu estas vere normale, ke ĉiam estu tri pasivaj participoj. Jen infanoj, kiuj ĵetas neĝbulojn en malfermitan fenestron. Ni aŭskultu ilin ! Paŭlo ĵetas, ili ĉiuj krias : *Ne atingita, ho vera knabino !* Karlo siavice faras neĝbulon kaj ĝin ĵetas : *Ankoraŭ ne atingita, vera sucinfano !* Johano tiam prenas sian bulon kaj ĝin ĵetas : *Ho, atingota, jes atingita, vivu Johano !* Tiam aperas ĉe la fenestro kolera vizaĝo. Fuĝo al alia fenestro.

A.- Stulta ludo !

Cl.- Jes, vere ! Mi ludis ĝin, kiam mi estis knabaĉo. Sed kial la infanoj kriis **atingota**, kiam ili vidis la bulon iri en la bonan direkton, kaj kial ili kriis poste **atingita** kaj ne **atingata** ?

A.- Nu, **atingota**, ĉar ĝi estis sur la vojo, sed ne ankoraŭ atingis la fenestron. **Atingata**, estus kiam la bulo ĵus enirus la fenestron. Sed fakte... tiu momento estas vere tro eta, oni ĝin ne rimarkas. Do, estas normale, ili povis diri nur **atingota** kaj **atingita**.

Ata-ita

Claude Gacond, 164-a radioprelego, 1966.11.30 & 1966.12.03

Cl.- Kaj se la bulo ne estus enirinta la ĉambron, ili estus kriintaj : **atingota**, ho, **ne atingita** ! Sed **preskaŭ atingita** ! Ho fortulo, rekomencu !

A.- Do en tiu ekzemplo la verbo atingi nur povas havi du participojn pasivajn: mi skribas en la **ota**-kolono **atingota** kaj en la **ita**-kolono **atingita** kaj metas strekon en la **ata**-kolono.

Cl.- Ni revenu al Paŭlo, Karlo kaj Johano. Ili ridaĉas. Vi vidis ŝin ! Kia kolero ! Estas pli komike, ol filmo ! Subite Karlo ekkrias : Ho ve ! Mi perdis mian ŝlosilon ! Ni serĉu ĝin ! Jes ! Nun ili serĉas la ŝlosilon.

A.- La ŝlosilo estas **serĉata**.

Cl.- Sed ili ne trovas ĝin.

A.- Ĝi ne estas **trovita**.

Cl.- Ili ne plu serĉas ĝin.

A.- Ĝi ne plu estas **serĉata**.

Cl.- Karlo tamen reserĉos ĝin post la nokto. Kia ĝi estas dum la nokto ?

A.- Ĝi estas **reserĉota** !

Cl.- Estas la mateno, Karlo reserĉas ĝin !

A.- Ĝi estas **reserĉata**.

Cl.- Subite li trovas ĝin.

A.- Ĝi estas **trovita**.

Cl.- Ĉu Karlo ankoraŭ pensos pri la serĉado ?

A.- Ne, nun li pensas pri la **retrovita** ŝlosilo.

Cl.- Pro tio oni ne povas paroli pri **serĉita** aŭ **reserĉita** ŝlosilo, sed ŝlosilo, kiu estas **serĉata**, kiu estos **serĉata**, estus **serĉata**.

A.- Do en tiu ekzemplo la verboj serĉi kaj reserĉi ne havas **it**-participon.

Cl.- Ekzakte !

A.- Mi do skribas **serĉota**, **reserĉota** en la **ota**-kolono kaj **serĉata** kaj **reserĉata** en la **ata**-kolono kaj faras strekon en la **ita**-kolono.

Cl.- Ni ne havas tempon skribi aliajn ekzemplojn. Ni nur revenu al **trovita**. Kial vi hezitis, kaj ne diris **trovata** ?

A.- Ĉar se li trovas la ŝlosilon, ĝi estas **trovita**. Li jam vidas ĝin. Mi rimarkis, ke estas verbo de la sama speco, kiel atingi.

Cl.- La kursestroj instruas ĝenerale, ke ekzistas simetrio inter **as**, **ant** kaj **at**, sed vi rimarkas per **atingi** kaj **trovi**, ke tiu simetrio estas nur iluzia. Kiam la neĝbulo atingas la fenestron, la fenestro

A.- estas **atingita**, kaj kiam li trovas la ŝlosilon, la ŝlosilo estas **trovita**.

Cl.- Multaj kursestroj kredis kaj kredigas al siaj kursanoj, ke **it** kaj **at** havas tempan signifon. Fakte la tempa signifo estas entenata en la help-verbo esti. Se ni turniĝas al la klarigoj de Zamenhof, ni konstatas, ke li difinas **ata** tiel : **komencita kaj nefinita**. Al **ita** li donis la sencon **ago plenumita kiel fakto**.

Ata-ita

Claude Gacond, 164-a radioprelego, 1966.11.30 & 1966.12.03

A.- Mi eble skribos tion. En la **ata**-kolono mi skribas **komencita kaj nefinita**. En la **ita**-kolono : ago plenumita...

Cl.- kiel fakto.

A.- **Ago plenumita kiel fakto.**

Cl.- Vi bone observu por kontroli, kion mi tre rapide observigis al vi. Kaj se la temo vin interesis, tiam legu en *Lingvo kaj vivo* de Waringhien la ĉapitron pri la esperanta pasivo, aŭ eĉ studu la traktaton *Vojaĝo inter la tempoj* de Kalocsay.

A.- Vi aŭdis elsendon de Radio-Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond pri la esperanta pasivo. Ĝis reaŭdo !

-oOo-